

AVENO #38 (2012) - Ekologio kaj Ekonomio

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj, eĉ se la problemoj plu-duras. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion. Novaj temoj en nia retejo <http://www.verduloj.org>, novaj je la enirpago, aliaj sub "Dokumentoj"

- Klimatokonferencoj KOP/COP: 2012-12-11 Minimuma rezulto je la Klimato-Pinto en Dubai
- Pri la historio, bonvolu legi la kolekton de Giankarlo Rinaldo: <http://www.verduloj.org/klimato.htm>
- Pri Palestino
- Trakti rubajhon

Organizajhoj subtenataj de AVE-anoj

Mazingira en Tanzanio: <http://www.verduloj.org/mazingira.htm>

PIEADC uzante Esperanton por regiona evoluo

PIEADC estas neprofitasocio por evoluiĝo kreita 2006 de Etienne KATCHELEWA kaj aliaj dum sia universitata studado pri agronomio, cele lukti kontraŭ la malriĉeco en la urbeto Kalima/Maniema, D.R.Kongo, kiu situas 100 km for de Kindu, la ĉefurbo de la provinco Maniema. Etienne kiel filo de tiu urbeto deziras kontribui al la disvolviĝo, li lernis Esperanton en Goma je SBV.

Tie iam estis Belga societo SOMINKI, gvidita de Italoj kaj Belgoj - bankrotis 1996 dum la milito de Laurent Désiré KABILA.

PIEADC signifas: Agronoma programo de iniciatoj kaj enkadriĝo por la komunuma disvolviĝo. Ĝi posedas ejojn por brutaro kaj oficejon, kaj havas lagojn kaj aliajn kampojn, por la vilaĝanoj kun kiuj ni kunlaboras. Laŭ la statuto kaj leĝe rekonita en la Jaro 2006 estis 11 personoj; 2012 ni estas 20 personoj. PIEADC amendos la statuton kaj la asocio tuj iĝos "SPDD": Kampano Solidareco por la Daŭra Disvolviĝo.

Raporto de 2012:

PIEADC bone evoluas malgraŭ la lasta cedo aŭ rompiĝo de la digo de unu el niaj lagoj. Ni per iom da mono, kiun ni ricevis post la vendo de fiŝoj, plibonigis alian lageton. Ĉe ni estas 36 lagoj. Kiam ni ricevis la unuan monhelpon, ni plibonigis nun kvar. Ĉar ili estas grandaj. Ni volas plibonigi ĉiujn lagojn por havi sufiĉe da fiŝoj por la merkato, kaj prilabori ilin konservante en fridigilo.

Necesas ripari la digojn de aliaj lagoj. La taŭga periodo por plibonigi lagojn estas dum la sen-pluva sezono, fine de Majo ĝis la unua semajno de Oktobro.

PIEADC, c/o Etienne KATCHELEWA KANDOLO

Urbo: Kalima n°29, Kvartalo : Munyangi, Lando: D.R.Kongo

Retadreso : pieadc2006@yahoo.fr

UEA-Konto: ekkn-y (de Etienne Katchelewa)

pli: http://www.westermayer.de/manfred/verduloj/PIEADC_Mazingira.rtf

2012-10-09 (teksto de Etienne KATCHELEWA, kunmetita de Manfred Westermayer, AVE@verduloj.org)

Ret-Ligoj - koncize

Naturamikaro denove uzas Esperanton - jen retejo kun multaj informoj pri la migrado kaj naturprotektita politiko (klimato, akvo, ...): <http://eo-naturamikaro.webnode.nl/>

Naturafabla kaj saniga turismo: <http://eo-naturamikaro.webnode.nl/verdaj-vojoj/>

Rio+20 - Aliaj CSO (civil-sociaj organizajhoj) - en diversaj lingvoj:

Baza informo en Esperanto + de, en, fr, jp, kr:

<http://vorort.bund.net/suedlicher-oberrhein/index.html>

Amikoj de la Tero/ Friends of the Earth - informrica retejo:

Usono: <http://www.foe.org>

Ligoj al ĉiuj tutmondaj grupoj (en, es, fr): <http://foei.org/>

Amikoj de la Tero en Eŭropo - ligoj al ĉiuj landaj organizoj

(Eŭropaj lingvoj) <http://www.foeeurope.org/network>

BUND - pri **Agendo 21 & Daŭropoveco**: (de) <http://bund.net/nachhaltigkeit>

Leo sendis la jenajn **pozitivajn mesaĝojn pri la naturo kaj medio:**

<http://members.aon.at/aldone/peranto/index.html>

skribe kaj aŭde sendas mesaĝojn - en laŭdinde zorga elparolado - precipe de Anton Oberndorfer.

La ozona tavolo super la Arkto rekreighas: <http://peranto.posterous.com/la-ozona-tavolo-rekreigas>

Nova fonto da kritikaj informoj en Esperanto: <http://neniammilitointerni.over-blog.com/>

2012-07-18 La informbulteno de **Monda Solidareco kontraŭ la Malsato:**

MONDA SOLIDARECO n-ro 106 estas nun havebla en pdf-formato

en Esperanto: <http://www.globidar.org/solidareco/ms106-eo.pdf>

en html-formato : http://www.globidar.org/solidareco/monda_solidareco.htm

en franca lingvo : <http://www.globidar.org/solidareco/ms106-fr.pdf>

Bahaa religio kaj daŭropoveco:

<http://www.bahaaeligo.bahai.de/> , <http://bic.org/statements-and-reports/searchDoc>

Ekologio

2012-11 **Irana insulo Geshmo** - ighis monda geoparko:

La du-lingva irana ĵurnalo raportis i.a. pri la valoroj de tiu ekologie kaj geologie interesa insulo en la Persa Golfo. Atentu: la esperanta versio komencighas je la fino de la dosiero:

<http://www.espero.ir/revuo/IE-2-Reta.pdf>

Irano devus aliri al pli civitana politiko por denove allogi pli da turistoj, i.i. esperantistoj.

2012-08-19 **Arboj, arbustoj kaj alia verdaĵo en urbo kapablas pli efike purigi la aeron.**

Sciencisto de Lancaster University specife esploris, kiun efikon urba verdaĵo havis al nitrogena dioksido kaj fajna polvo, du malpurigaj aĵoj, kiuj malutilas por homoj, kaj kiuj ofte superas la sekurajn limojn en urboj.

Grimpoplantoj: Antaŭa esploro taksis la efikon de urba verdaĵo je proksimume 5 %. Sed la sciencistoj koncentriĝis pri la efiko de verdaĵo en "urbaj fendoj": mallarĝaj stratoj inter altaj konstruaĵoj, kie la aero stagnas.

Iliaj mezuradoj montris tute alian rezulton: la bone pripensita lokigo de gresoj, grimpoplantoj aŭ arboj en tiaj fendoj malpliigas la koncentriĝon de nitrogena dioksido per 40 procentoj kaj tiun de fajna polvo per 60 %.

La aŭtoroj vidas precipe grandan eblon por grimpoplantoj, ĉar tiuj povas kovri grandajn surfacojn sen bezoni kroman lokon. Ankaŭ arboj povas esti efikaj, se estas sufiche da aer-movigo sub sia foliaro.

(IPS/INM , Originala artikolo en la flandra tradukita kaj sendita de Leo)

www.knack.be/nieuws/planet-earth/groen-in-de-stad-veel-effectiever-dan-gedacht/article-4000164289639.htm

2012-10 **Invadantaj plantoj, bestoj, insektoj** ktp. en Europo; pri tio informas la Helmholtz Centro:

<http://www.sonnenseite.com/Umwelt,Liste+der+gebietsfremden+Arten+Europas+umfassend+aktualisiert,16,a23402.html>

2012-11 **Paradizo-birdoj** - vivas ankoraŭ sur la tero -en **Nova Guineo:**

Jen bela filmeto (5 min) kun la interesa demando - kial ili evoluis ĵhus - kaj sole - tie.

(angle parolita) <http://www.cornell.edu/video/?VideoID=2398>

(dankon al Jakvo ! - ankaŭ tiaj belecoj estas instigoj protekti la restantan pra-naturon kontraŭ industria detruo - eble ni devas redukti niajn bezonojn)

2012-12 **Savu la Bjeloveshchaja Pushcha** (orientpola & belorusa praarbaro). Jen informoj de Greenpeace-Pollando: [http://links.mailing.greenpeace.org/ctt?](http://links.mailing.greenpeace.org/ctt?kn=5&ms=NDA2OTQ3MjYS1&r=ODQxNjIwNTgyMAS2&b=0&j=MTcwODYyNzQ2S0&mt=1&rt=0)

[kn=5&ms=NDA2OTQ3MjYS1&r=ODQxNjIwNTgyMAS2&b=0&j=MTcwODYyNzQ2S0&mt=1&rt=0](http://links.mailing.greenpeace.org/ctt?kn=5&ms=NDA2OTQ3MjYS1&r=ODQxNjIwNTgyMAS2&b=0&j=MTcwODYyNzQ2S0&mt=1&rt=0)

Latvio malshparas arbarojn:

La ŝtato nun permesas faligi arbarojn grandskale. Ekz-e la ŝtata kompanio LVM ne bone zorgas por ekologie adaptita arbaro-faligo, kaŭzante ne-renverseblajn damaghojn. La arbaroj ankaŭ en Latvio havas plurajn funkciojn por sovaghaj bestoj kaj plantoj, preventado de erozio, stokado da trinkakvo.

(lau <http://www.care2.com/go/z/e/AGgpO/zmKD/Bx1er>)

2012-05-10 Panamo-Pluvarbaro:

Germanoj (kaj aliaj) helpu **savi la Tabasara-ranon** kaj aliajn rampulojn, planita barlago subakvigus ilin. La indigenoj de la etno Ngobe protestas kontraŭ la konstruado de la Barro-Blanco bardigo; evidente nur tie vivas tiu rano (endema specio). La germana investstado kaj evoluo-banko DEG kun aliaj ne donu la monon por tiu granda projekto; malgrau ke temas pri produktado de regajnebla energio.
<http://www.regenwald.org/aktion/872?mt=1348>

2012-12 Australio, Usono kaj EU malpermesas ne-legalan ligno-merkaton.
(de, en, es, fr, pt) <http://www.regenwald.org/erfolge/4761/australien-verbietet-illegales-tropenholz>

2012-12 EU Liberigas importon de palm-oleo el Peruo kaj Kolumbio - minacas la pluv-arbaro kaj HR-ojn. La konzernoj kiuj ricevas licencojn forhakos la pluvarbaron por planti oleo-palmojn. Krome ili forpelas la indigenojn kiuj vivas tie. Krom tio la sen-skrupola ekspluatado de mineraloj detruas kaj poluas akvo-fontojn.

Ili murdigas protestantajjn homojn, kaj- dum la jaro 2012 en Kolumbio 34 sindikatistojn, en Peruo 16 homojn.

Se vi emas helpi, bonvolu subskribi baldaŭ; la teksto trovighas tie en 5 lingvoj:
(de, en, es, fr, pt) <http://www.regenwald.org/aktion/898?ref=nl&mt=1484>

2012-11 Senarbarigo en Afriko - Nighero:

Mi estas juna estro de la Verda Partio RSV'Niima, <http://www.rsvniima.org>

Mi laboris kun NRO (pli bone CSO = civil-socia organizo) pri humanitaraj aferoj: SADEV/Niger kaj CONIPRAT/Niger, kiu luktas kontraŭ malutilaj tradiciaj praktikoj kiuj tuŝas sano kiel virina mutilacio, ina genitala kripligo.

Ekzakte jhus nun popoloj en nia lando forhakas arbojn por kui-forno speciale dum la ferioj Tabaski, por kio oni buchas ŝafojn. Kaj por tio necesas ligno por la kuirado au rostado.

La arbara ekspluatado daŭrigas, ankoraŭ malmultaj homoj konscias pri la ekologia danĝero. Por kuiri oni proponas uzi (bio)gason. Informo kaj trejnado - pri pli efika uzado de energio (ligno) - kiun mi ĉiam petas de institucioj estas ne auskultata. Kune ni povas agi. Pripensi eventualan kunlaboron kun AVE pri ekologiaj aferoj. Eĉ la ligno uzita en la maŝo povas esti konservata sed vane - mankas la konscio.

(informoj de Boukari Illiassou, Niamey, Nighero)

Komentoj de AVE/mw - pri temoj en Nighero:

Re-planti arbojn kaj protekti ilin - instigita de Wangari Maathai - donos laboron, kiun devus pagi au la ŝtato au kooperativoj. Je arbo-plantado oni devus elekti bonan miksaĵon da arbo-specioj por havi ankau fruktojn - kaj ombron, kaj lignon.

Mi jhus legis pri la arbo Moringa, kiu kreskas en multaj afrikaj landoj - ties folioj estas mangheblaj kiel spico au legomo. La homo kiu skribis pri tio venas el Nigerio.

La alia afero estas produkti pli bonajn **fornojn** (ekz-e el argilo) por pli bone utiligi la energion de la ligno. Kun Mramba Simba (en Tanzanio) ni vizitis CSO-on en Germanio, kiu evoluis la kuiradon per la suno. Krom la metalaj speguloj (kiuj estas eble multekostaj) - eblas konstrui keston (bone izolitan, kaj ene nigre kolorigita) kun vitra fenestro, kiu enlasas la sunon kaj kreas altan temperaturon. Ghi taugas por pretigi kachon au simile.

Amikoj de la Tero en la proksima lando Nigerio, <http://www.eraction.org>

Agendo 21 & Klimato

2012-11-25 Tutmonda Klimata konferenco, KOP/COP, en Doha (Kataro) lanchita - chu almenau malgranda sukceso ? pli sur http://www.verduloj.org/m_klimato.htm

2012-07: Rio+20 Multe da parol-bobeloj - mankas vera rezulto:

La brazila pinto-estraro ech ne akceptis diskuti la antau-preparitan Finan Deklaron:

- Mankas mono por dauripova evoluo.
- Mankas devigo por la internaciaj financ-institucioj (Monda Banko, IWF) financi nur dauripovajn investojn.
- Libera Merkato & Kreskado restas la celo.
- Verda Ekonomio estas la slogano, sed sub la direkto de Kreskado efikos kvazau Placebo.

(de + ligoj al aliaj) <http://www.klimateam@bund.net>

2012-05-18 **Haltigu la subvenciadon al nafto-konzernoj** por bremsi la klimato-katastrofon. AVAAZ kolektas vochojn por postuli je la G8-pintokonferenco (renkontigho de la 8 plej potencaj shtatoj): Ne pagi subvenciojn al grandaj nafto-konzernoj, sed preni pli da impostoj de ili. Tio instigus redukti la teknologiojn kiuj eligas CO2, favore al tiuj kiuj uzas energion plej efektive. Ekzistis peticio, la retejo uzas 14 lingvoj (sed ankoraŭ ne Esperanton): http://www.avaaz.org/de/a_new_plan_to_save_the_planet/?v1
Jen kelkaj rilataj informoj:
(de germana instituto) <http://www.pik-potsdam.de/aktuelles/pressemitteilungen/klimaschaedliche-subventionen-streichen-201ewir-haben-unmengen-moeglichkeiten201c>
(komento de germana gazeto, Frankfurter Rundschau): fr-online.de/meinung/kommentar-deutschland-als-lotse-des-gruenen-wachstums,1472602,15225332.html
(komentoj de usona kaj brita gazetoj) <http://articles.latimes.com/2012/apr/05/opinion/la-oe-mckibben-stop-oil-subsidies-20120404>
<http://www.guardian.co.uk/environment/2012/jan/19/fossil-fuel-subsidies-carbon-target>

2012-04-13 **Nova Averta de Klubo de Romo:**

Same kiel la gvidantoj de la Titanic, kiu krasis al glacimonto - neglektante avertojn; shajnas la nuna afero rilate la Tera situacio: daŭra kresko de la homaro, foruzado de naturaj resursoj kiel arbaroj kaj fekunda grundo, kaj shangho de la tutmonda klimato ...
Bonvolu legi la tutan tekston sur nia retejo:
<http://www.verduloj.org/dokument.htm> > Temoj: ekologio, ...
(dank al John Dale, kiu amendis la tekston per informoj el la Baha'i religio)

Maro, Marbordaj Regionoj, Riveroj, Lagoj

2012-09 **Granda Barajho-Rifo malgrandighadas !**

Pro pli fortaj ventegoj la koraloj estas ghenataj, sed mutle pli pro speco da grandaj (mar-steloj, de: Seesterne), nome dorno-krono. Tiuj amasighis pri eutrofiado de la maro: kiam la riveroj transportas pli da nutraĵoj en la maron, kiu nutras la algojn, kiujn manghas la larvoj de tiu Seesterne.
(lau dpa, Bad. Ztg. 2012-10-02, p. 10)

2012-10-29 Bonvolu subskribi favore al **Antarkta Protektita Maro-regiono:**

Nuntempe okazas traktado protekti balenojn, pingvenojn kaj aliajn marestaĵojn kontraŭ kaptadon per industria fishkaptado en areo de 6 milionoj da kvadrataj kilometroj ĉirkaŭ la Antarkto
Bedaurinde Rusio, Suda Koreio kaj kelkaj aliaj registaroj ne emas akcepti.
Bonvolu subteni: http://www.avaaz.org/de/save_the_southern_ocean_5/?bGgALab&v=18910

Pli da detaloj (de): <http://www.ifaw.org/deutschland/aktuelles/meeresschutzbericht-antarktis-ver%C3%B6ffentlicht-koalition-von-umweltverb%C3%A4ndernden-fordern-schutzg>

2012-07 Ni **ship-vojaghis sur la Danubo** de Passau al la Nigra Maro kaj reen kaj faris plurajn ekskursojn. Ni (Manfred Westermayer) lernis multon pri la Balkana Historio. Ni veturis dum 17 tagoj per ukraina ŝipo (Nicko Tours), kaj konstatis, ke la fuelo (kaj eble motoro) estas de malbona kvalito – pardonu. Krome mi eksciis, ke chiu pasaghero foruzadis ch. duonan tunon da tiu fuelo.

2012-04: Bonvolu subskribi por la **focenoj en la Jangtse-Rivero:**

Chinio jam ekstermis la delfenon en la Jangtse, kaj nun la parenca dolchakva foceno, kiu nur tie vivas, estas minacata de ekstermado dum jardeko - restis nur ch. mil ekzempleroj.
La minaco venas kolisioj kun boatoj, ne-legala fishado, poluado kaj eble klimata shanghigho. Mortaj focenoj evidente malsatmortis.
La peticio redukti la minacojn estas direktita al s-ro Zhou Shengxian, Ministro pri Naturmedia Protektado de la P.R.Chinio. Jen la retadreso:
(koncize) <http://www.care2.com/go/z/e/AGIDX/zmTO/Bx1er>
(detale) <http://www.thepetitionsite.com/845/237/617/china-dont-let-the-freshwater-porpoise-disappear/>

Jen la retadreso de **tribestro Raoni de indianoj en la regiono de la rivero Xingu** en Brazilo, kiuj mem kreis peticion kontraŭ la giganta barlago, kiu detruos la vivbazon de la enloĝantoj kaj vivantaro.

(en pluraj lingvoj) <http://raoni.fr/unterzeichnung-petition-gegen-belo-monte.php>
(lau Nicole Margot, IKEL: <http://ikel.stel.net/>)

2012-11: **Ocean Grabbing - kio estas tio ?** Peticio al EU !

Certe vi jam scias kio estas Land Grabbing: al-kapto da agrikultura tereno por produkti nutraĵojn por eksporti ĝin al alia lando; do simila okazas pri al-kapto da mara tereno por fish-kaptado.

Malriĉaj shtatoj povas lu-doni sian defnitan maran terenon al grandaj fishisto-konzernoj por gajni iom da mono - kio ofte fluas en privatajn poshojn. La konsekvenco estas, ke unue la regionaj fishistoj ne plu povas kapti tiom kiel antaue, kaj due, ke la tuta populacio de iuj fish-specioj en tiu areo povas kolapsi (ke ne plu estas sufiche da ili por teni la normalan ekvilibron).

Ĉu EU estas konzerno ? Ne rekte, sed EU subvenicas fish-kaptan industrion kaj tiel ne-reakte la maro-alkaptadon. EU devas decidi regulojn, ke tiaj kompanioj, kiuj situas en EU, ne rajtas aĉeti kapto-raĵtojn en regionoj kiuj apartenas al alia shtato. Kompreneble restas la t.n. Alta Maro, kie ĝhis nun ne estas limigo kiu tamen necesus.

Bonvolu subskribi la peticion de Cae (el Usono): <http://www.care2.com/go/z/e/AG0xX/znCr/Bx1er>

Rimarko: Kaj kompreneble la vegetaranoj dirus, ke tute ne necesas fish-kapti; sed tio estas alia postulo.

Madagaskaro: Bonvolu subteni la pluvarbarojn - la legho Lacey en Usono devas resti valida.

Lobiistoj de lignokonzernoj postulas moligon au abolicion de tiu protekto-legho.

La muzikistoj en Madagaskaro petas subskribi, uzi lignon por la instrumentoj nur el lau-leghe faligitaj arboj; por protekti la pluvarbaron, kie ekz-e loghas la lemuroj, kiuj sinnutras de la fruktoj de la ebon-arbo.

(de) <https://www.regenwald.org/aktion/823/gitarrenhersteller-gibson-will-naturschutzgesetz-kippen>

(en) <http://www.rainforest-rescue.org/> , (fr) <http://www.sauvonslaforet.org/> , (pt) <http://www.salvalaselva.org/>

2012-08 **Turkio per bar-digoj je Hasankeyf k.a. detruos naturan pejzagon kaj nutraĵo-produkton.**

La aluviaĵo-regiono (ofte inundita) ĉirkaŭ la rivero Tigris en suda Irako estos trafataj de sekeco, se Turkio prenos la akvon por propra akvumado de granda nova tereno; kaj ankaŭ la barlago kaŭzos grandan forvaporighon.

En tiu regiono estas krom la naturprotekta zono ankaŭ granda kultivita tereno ne plu havos sufiche da akvo; kaj mankos la jaraj inundoj (supozeble ili okazis tie).

<http://www.internationalrivers.org/resources/protect-hasankeyf-on-the-tigris-river-4594>

2012-05 **Germanio tenas sharko-protektanton Paul Watson**, por eble liveri lin al Costa Rica. Paul agadis en 2002 kontraŭ la fia metodo kapti sharkojn kaj tranchi la dorsan flosan, kiu estas rigardata kiel bongusta - fi-bongusto!

Ekzistis peticio "liberigi Paul Watson" de la germana naturprotekta asocio "Pluvarbaro" direktita al la germana ministerino pri justico: (de) <http://www.regenwald.org/>

2012-05: **Kroatio celas detrui danuban ekosistemon** - kanalo da 33 mejloj ene de la Danubo !

Tio minacas ĉ. 300 birdajn speciojn (i.i. agloj, cikonioj, hirundoj) kiuj vivas en tiu biosfero; kaj certe ankaŭ aliajn akvo-vivantajhojn.

La apudriveraj arbaroj - simile al la pluvarbaro de Amazonio - vivas de la shanghighanta akvonivelo kaj profitas de inundoj. Bonvolu protesti je: <http://www.care2.com/go/z/e/AGMGY/zmWr/Bx1er>

Jen la ĝenerala **retejo pri la tuta Danubo**: <http://www.icpdr.org>

2012-04-10 **Chehio planas nedzirindan barajhon de la Elbo je Decin.**

Germanaj medioprotektantoj shtataj kaj civilsociaj protestas kontraŭ tiu-ĉi ideo.

Eĉ el ekonomia vidpunkto ili dubas, ĉu la tiel atingota ebleco al kargoshipoj vere estus profitdona investo ? Ĉar unue tia transporto al Chehio reduktighas, kaj pli grave la akvonivelo estas pli varia ol antaue pro la klimata shanghigho, kio malebligas ĉiutagan uzadon de la Elbo. Ja ekzistas fervoja linio apud la Elbo al chehio. La Elbo (chehe Labe) estas unu el la plej naturaj mezeuropaj riveroj. Decin situas rekte antaŭ la Erc-montara traŭo de la Elbo, proksime de la germana landlimo. Medioakorda esploro montris negativan rezulton:

La planita bar-lago ĝenus ne nur la ĉirkaŭajhon sed ankaŭ havus malbonan influon al la pli subaj bordoj en Germanio, kie vivas kastoroj. La akvo-kvalito malplibonighus, kaj la planita protekto de migrantaj fishoj ne estus konforma al la nun validaj protekto-reguloj. Dudek jaroj post la ege poluinta socialisma industrio en GDR denove vivas salmoj en la Elbo, tia barajho deprenus la aliron al la supraj vivejoj, necesa por la frajado. (lau Michael Bartsch, taz, 2012-04-10, p.9)

2012-04-09 **Naghantaj industriaj fishkaptoshipoj prirabas la regionajn fishistojn:**

Grandegaj eŭropaj fiŝistaj ŝipoj "prirabas" la marojn de norda-, kaj okcidenta-Afriko. Vidante la pli kaj pli malgrandan kaptaĵon la lokaj fiŝkaptistoj pretigas sin preni armilojn kontraŭ la ŝipegoj de Eŭropo kaj kaŭzigi kaoson, similan, kiu troviĝas en Somalio. <http://europacivitano.wordpress.com/>

Ja la insuloj de Fuerteventura ktp apartenas al Hispanio, k.a. Eble necesus pripensi, ĉu insuloj dise en la mondo daŭre rajtas esti teritorio de fora lando?

Oceanium en Senegalo ankau laboras por la regionaj fishistoj kaj la maro entute. Niaj samideanoj en Dakar ĵhus havis okazon paroli kun ties estro, Haidar el Ali, dum la Globala Verdpatria Kongreso tie.

Ne temas nur pri la EU-europa **fishindustrio**. Necesus kvotoj por fishistoj de la tuta mondo. Jen, kion volas la Verdula/Regionalista/Pirata Frakcio en la EP pri tiu temo:
(en & es, fr, ...) <http://www.greens-efa.eu/fisheries-41.html>

La **Eŭropa Komisiono** proponas novajn regulojn pri la fiŝkaptado de la profunda-maraj specioj en nordorienta regiono de la Atlantika Oceano. La profunda-maraj ekosistemoj kaj la specioj vivantaj en ĝi estas speciale sendefendaj kontraŭ la homa agado. La celo de la nova regularo estas tio, ke la fiŝkaptado okazu laŭ daŭrigeblaj metodoj, malkresku la kvanto de kroma, nedezirita kaj damaĝa kaptaĵo, malfortiĝu la efiko, kiu damaĝe tuŝas la vivlokojn kaj estu disponebla pli da sciencaj informoj pri tiuj specioj. (pli: eo)
<http://europacivitano.wordpress.com/2012/07/21/propono-pri-la-fiskaptado-de-la-profunda-maraj-specioj/>

Jen **kiel kondukti kiel konsumanto**: http://eo.wikipedia.org/wiki/Marine_Stewardship_Council
Komento de shtonĉjo al fishista politiko: Pli bone ol MSC: Li respondis, ke **ne necesas manghi fishojn**.

2012-03, **Globalaj Verduloj kongresis en Dakar.**

Unu el la gravaj tutmondaj temoj estas daŭropova fishado:

Ekzemple en la regiono de okcidenta Afriko, Senegalo k.t.p., grandegaj fishistaj ŝipoj detruas la ekologion kaj malplenigas la maron. La Senegala Civil-Socia Organizo (NGO) **Oceanium** aktivigas kaj lastjare kolektis 5 tunoj da grandaj najlonaj retoj, parte 1 km longaj. Ili postulas kotonaj retoj kiuj de si mem detruighas kiam ili estas perditaj. Ili ankau kolektas plastajhojn sur la bordo.
<http://oceanium.blogspot.com/search/label/P%C3%AAche>

Ankau rilate RIO+20: survoje al paradigmo de tutmonda ekosistemo (simile al la Gaia-hipotezo):

La Europaj Verduloj atentigas, ke la **Bordo de Arguin**, areo da 12 000 km² estas protektata mara regiono **antau Mauretano** ek de 1986 sub la Heredeco de UNESKO.

http://en.wikipedia.org/wiki/Banc_d%27Arguin_National_Park

Bedaurinde tiu fish-riĉa regiono estas super-fishita per industriaj ŝipoj kaj krome suferas de la IUU (nelegala, ne-raportita, ne-reguligita) fishado.

Nova granda strato, industrio kaj nafto-eksploatado estas aliaj minacoj al tiu Nacia Parko.

La Verduloj en EU postulas, regadon koncerne fishista politiko kiu estu daŭropova, kaj ke internacia fish-merkato devas esti superrigardata laŭ la MSC-Kondicho (Marine Stewardship Council).

2012-01-29 Bonvolu protesti je la prezidento de **Chilio**.

Lau informoj de "regenwald.org" **fishista industrio en Chilio** havas grandajn perdojn je salmoj, breditaj en kaghoj. Oni pretendas, ke maraj leonoj (*Otaria flavescens*, grandaj fokoj) forkaptas la nutrajhojn de la salmoj. Pro tio la registaro decidis mortpafigi amase marajn leonojn.

Sed la naturprotektantoj rakontas alimaniere: la amasa bredado da salmoj kaŭzas atakon de virusoj, kiu mortigas la salmojn. Krome la fishindustrio forkaptis ĉion antaŭ la chila marbordo, eĉ la malgrandajn fishojn - por doni ilin al la salmoj.

Krom tio tia amasa bredado detruas la ekosistemon de tiu mara regiono.

Do, unue - bonvolu mem redukti la manghadon de salma viando, kaj due bonvolu subteni la alvokon:

<http://www.regenwald.org/aktion/830?mt=1283>

(de, es) La teksto de la peticio estas en la germana kaj (pli sube) en la hispana, kaj jen la retejo de la chila (es) <http://www.soslobosmarinoschile.cl/>

2012-04-13: **Mortiga Bruego en la Maro:**

La Usona konsilio pri defendo de la naturo esploris la amason da mortaj delfenoj je la bordoj de Peruo kaj Usono. Usono jam klopodis redukti aplikadon de Sonar dum la tempo kiam delfenoj naskas, sed tio tute ne suffichas:

Michael Jasny diras, ke ili spertas similan, kiel ni kiam dinamito eksplodadas apud ni dum tagoj kaj monatoj. Fakte la uzado de Sonar (ehho de subakva bruego) en la profunda maro pro la sisma esplorado de la submara tereno serchante nafton (au aliajn fosiliaĵojn) kaŭzis la miloblan mortadon da delfenoj (kaj eble ankaŭ de aliaj marvivajhoj). Kompreneble ili ne fulmrapide mortas, sed suferas hemoragion (interna sango-elflugo - laŭ mia kompreno pro la kaŭzitaj de la bruoj premdiferencoj), laŭ la perua CSO (NRO) ORCA.

(es, en) <http://www.orca.org.pe>

Iama peticio al la Usonaj respondeculoj por protekti la sovaghan vivantajhon:

<http://www.thepetitionsite.com/509/308/950/stop-killing-dolphins-with-sonar/>

Ankaŭ ekzistas aplaŭdindaj bonkoruloj. Ĉu hazardo, ke precipe **nigrahaŭtuloj helpis la delfenojn?**

<http://elcomercio.pe/player/1384898>

2012-05-02 **Nur 55 Maui delfenoj restas kaj Nov-Zelando permesos mortigi ilin**, se oni ne ĉesos fishkapti per grandaj retoj en ilia habitato. Kune, ni povas persvadi la Ĉefministron savi la delfenojn. Nova raporto montras, ke delfen-nombroj duoniĝis en ses jaroj.

Miloj novzelandanoj vokas malpermesi mortigajn retegojn kiu respondecas por multaj delfeno-mortoj, sed la fiŝista industrio ne intersighas pri tio.

Se, iu plia de ĉi tiuj unikaj delfenoj mortos povas esti tro malfrue por savi ilin. AAVAZ planas agadon en Australio, sed ankaŭ aliaj homoj rajtas protesti, ĉar temas pri tutmonda afero. Kial ?

La delfenoj de Maui estas trovitaj nur apud la okcidento-marbordo de la Nord-Insulo de Nov-Zelando, kie vizitantoj foje vidas la ludeman estaĵon nutri en malprofundaj akvoj. Nun ĉi tiuj delfenoj estas la pleje endanĝerigita mara mamulo de la mondo, se pliaj kvin da plenaĝuloj mortas, ĉi tiu malrapide bredanta estaĵo sekvos la Didon (jam ekstermita birdo) al malapero.

http://www.avaaz.org/en/days_to_save_the_worlds_smallest_dolphin/?tta

Dankon al Penny Vos, mi elektis nur 2 ligojn pri tiuj specialaj delfenoj je Australio:

<http://www.scoop.co.nz/stories/SC1203/S00069/new-research-shows-way-to-saving-hectors-mauis-dolphins.htm> kaj http://www.nzherald.co.nz/environment/news/article.cfm?c_id=39&objectid=10793020

Jen informo pri planita barajho "El Quimbo" je la **Rio Magdalena en Kolumbio**. 82 kv.km da pluvarbaro estos detruitaj; vivejo de milionoj da plantoj, bestoj kaj 1500 homoj, kiuj vane protestis.

ENEL/Endesa parolas eufemisme pri Verda Energio, sed fakte estas giganta perdo.

Ni subtenu ilin per nia subskribo: <http://www.regenwald.org/aktion/849?mt=1303>

«Indianoj en granda danĝero»

En Februaro 2012 la teamo de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo, Stefano Keller, Verena Graf, Adrien Tanner kaj Nicole Margot ĉeestis la antaŭpremieron de la dokumenta filmo "**Indiens en sursis**" de Daniel Schweizer, produktita de "Temps Présent", elsendo de Radio-Televido Svisa (RTS).

Ekde 1997 la **Tutmonda Organizo Kontraŭ Torturo** (TOKT) <www.omct.org> kreis "Observan instancon por la protekto de la defendantoj de Homaj Rajtoj" kunlabore kun la **Internacia Federiĝo de la Ligoj pri Homaj Rajtoj**. Kaj en 2007, kun la financa subteno de la svisa Federala Departemento pri Eksteraj Aferoj, ĝi kreis projekton "**Defendantoj de la defendantoj**" alvokante plurajn svisajn personecojn por ke ili dediĉu sian famon je la servo de la homrajtaj defendantoj, ĉiam pli minacataj. La ĉefa celo de tiu patronado estas protekti la homrajtajn defendantojn kontraŭ persekuto kaj turmentaj agoj pro iliaj aktivadoj de defendantoj pri libereco kaj bazaj homaj rajtoj.

En tiu kadro Daniel Schweizer filmis mision de TOKT en Brazilo, patronitan de la aktorino Noémie Kocher. Tiu misio celis la renkonton kun la "defendantoj" **Raoni Metuktire**, fama ĉefo de la Kajapooj kaj **Davi Kopenawa**, ĉefo de la janomamoj por evidentigi la problemojn de la aŭtoktonaj popolrajtoj fronte al la ekonomia disvolviĝo en Brazilo.

Dum duonhoru la filmo ege bone prezentis la absolute malesperan situacion de tiuj pacaj popoloj fronte al konstruo de **barajegoj de Belo Monte sur la riverego Xingu en la ŝtato Parà**, kie vivas la kajapooj, kaj fronte al la orserĉantoj, kiuj neleĝe invadas kaj detruas la teritorion de la janomamoj, kiu laŭleĝe devas esti protektata fare de la brazila ŝtato. La barajegoj ne estas konstruitaj por doni elektron al la brazila popolo, sed por grandaj transnaciaj firmaoj, kiuj instaligos en la regiono. Ni do konsilas vin, se vi povas, **spekti la filmon:**

<http://www.rts.ch/emissions/temps-present/international/3787537-indiens-en-sursis.html>

Kaj laŭ ni la sola konkreta ago por helpi tiujn popolojn estas du peticioj de TOKT: “Ne la Belo Monto digo!”, “Por protekti la rajtojn de la Yanomami”, kiujn vi povas trovi en Esperanto (bedaŭrinde en malbona Esperanto) je la sekva adreso; kaj **ni petas vin subskribi ambaŭ**:
<http://www.omct.org/fr/human-rights-defenders/defend-defenders/indigenous-under-threat/>

Pli da detaloj pri la barajegoj de Belo Monte: http://fr.wikipedia.org/wiki/Projet_de_barrage_de_Belo_Monte
- Pri la kajapooj: <http://eo.wikipedia.org/wiki/Kajapooj>
- Pri Raoni Muktire kaj Yanomami – vizitu Vikipedion eble de via lingvo.

- Pri la brazilaj indianoj kaj pri la lukto de aŭtoktonaj popoloj ĉe la Konsilantaro de la Homaj Rajtoj en Ĝenevo, vi povas legi artikolon en la numero 78 de *Etnismo* je: <http://www.gazetejo.org/eo/node/403>
Ankaŭ larĝskala disvastigo en diversaj lingvoj de tiuj ĉi informoj en diversaj lingvoj estus utila.
(iomete koncizigita, laŭ informo de Nicole Margot, IKEL)

2012-02: **Vundoj de la Tero** - kauxita de la specio homo sapiens:

akompanu germana jhurnalistino vizitante por ni tiujn lokojn kaj temojn: ekz-e:

- **Gajni nafton el gudro-sandoj** en Kanado detruas grandskale la pejzaghon, poluas la aeron kaj akvon, kreas kancero-malsanojn je la loghantaro, foruzas pli bonan ter-gason - por gajni iom pli da nafto-energio (kaj profito).

- en **Tasmanio oni forhakas gigantajn praarbarojn** por kultivi eukalipto-arbojn; kompleta biosistemo detruighas kaj oni liberigas gigantajn kvantojn da karbondioksido forbruligante la tigoj, kaj ĉar la ne-protektita grundo eligas CO₂.

- **balenoj kaj delfenoj terurighantaj** de mara bruoj, kaj pro ne-intencita kaptado de porkaj delfenoj en la retoj (ekz-e en la Balta Maro). Je konstruado de vento-turoj en la maro eblas pleje redukti la bruon pere de aer-bobela vualo. (de) <http://www.dradio.de/dlf/sendungen/wundendererde/>

Senakva medioafabla necesejo, jen konstru-plano: <http://www.compostingtoilet.org/>

Demando: ĉu ĝi estas konkurenca al biogas-produktado ?

Teorie ĝi povas esti, sed praktike ankoraŭ ne ekzistas multaj biogasproduktiloj.

Kaj se oni havas unu tian, oni povas enmeti la komposton de la necesejo kaj poste uzi la restojn sterke. Eĉ pli bone ĉar la metano estas klimaaktiva kaj tial pli bone uzighas bruligajhe.

http://www.verduloj.org/k_necesejo_ekologia.htm

(dankon al Gereon (2012-02-06))

2012-09-03 **Feku en saketon - higiena kaj efika**

Ĉ. 2 miliardoj homoj ne havas taŭgan necesejon. Tio kauxzas ofte malsanojn.

Juna sveda entrepreno evoluis solvon por tiu sanitara problemo. Camilla Wirseen laboras kaj testas la produkton en Kibera, slamo de Nairobi. Tie oni ankaŭ produktas ghin. Temas pri duobla saketo, kaj estas biologie malkomprenebla. Vi metas ghin sur sitelon, urinas kaj fekas, fermas la saketon kaj vi povas doni ghin al kompostejo. Por ne kauxzi malsanojn, ĝi interne enhavas ureon, kiu post mallonga tempo (se estas varma) shanghighas en amoniakon - kiu mortigas ĉiujn bakteriojn.

Nun oni produktas la saketojn en Nairobi kaj testas la uzadon.

<http://www.peepoople.com/>

Alternativaj Energioj & Efikeco

2012-09 **Ne-radioaktiva Kurento**

La kooperativo Enercoop provizas en Francio per kurento, kiu estis produktita pere de alternativaj regajneblaj metodoj: fotovoltaike, akvoforto, biogaso kaj ventogeneratoroj.

Jen la retadreso de provizantoj de regajnebla energio:

(en Belgio, de Leo) <http://www.ecopower.be/>

Leo: ni aĉetas nian elektron ĉe Ecopower, kiu liveras elektron el 100% renovigeblaj fontoj.

(en Francio) <http://www.enercoop.fr>

(en Germanio) <http://www.ews-schoenau.de/>

2012-01-15 **Uzi LED ampolojn por vere shpari energion:**
(de) <http://umweltinstitut.org/fragen--antworten/energie/rohstoffe/led-938.html>

2012-05: Konsiloj de la Europa Komisiono en 22 lingvoj pri lumigiloj:

Plej efikaj estas LED-aj:

<http://ec.europa.eu/energy/lumen/>

Intertempe mi mem uzas la novajn LED-lampojn je kelkaj okazoj - aparte kie la kolora kvalito ne tro gravas. Ankaŭ por legi librojn ili bone taugas.

Ili konsumas ege malmulte da energio (1W = 25 W da ardanta bulbo !), estas tuj hele (kompare al maljunighantaj gas-lampoj), kaj ne enhavas hidrargon. Sed iajn Rarajn Terajhojn (Seltene Erden) - do, necesus rekolekti ilin poste.

Nigra PV - uzas ankaŭ la Infra-rughajn-radiojn - kun pli alta rendimento:

<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Solarzellen+auf+Schwarzem+Silizium+%E2%80%93+Wirkungsgrad+durch+neue+Technik+verdoppelt,6,a21312.html>

Civitanaj **energio-kooperativoj** estos la estonta maniero produkti regajneblan energiojn. Ekz-e en la regiono Palatinato – Alsaco: Regionalbuero-Solar-Buerger@web.de

Desertec: La unua projekto por produkti sun-kurenton en la nord-afrika dezerto por liveri ankaŭ al Europo - planita en Tunizio, Alia projekto jam laboras en Egiptio – Kuraymat. <http://www.nurenergie.com/>

Produkti sunkurenton sur forcejaj tegmentoj:

<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Groesste+gewaechshausintegrierte+PV-Anlage+errichtet,6,a21202.html>

Endoma PV por nutri komputilajn k.a. ekipajhon:

<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Solarenergie+fuer+drinnen,6,a21206.html>

(de Sonnenseite Franz Alt, 2012-01-29)

Jen ligo al subtenantoj de **regajneblaj energioj en Chehio**, kion mi ricevis de la Verda Partio, ĉar ili subtenas tiun vojon: (cz) <http://chytraenergie.info/>

2012-08 **Vilaghoj kaj urboj ne dependaj de kurento-reto.**

Jen vi trovos artikolon ke eblas prukti surloke la bezonatan energion por tuta vilagho au urbo:

(en) <http://www.internationalrivers.org/world-rivers-review/world-rivers-review-%E2%80%93-september-2012-focus-on-community-energy>

2012-08 **Energia Revolucio en Kubo - efikeco evitas importon da fuelo**

Pro mankego da energio ŝtatestro Fidel Casto iniciatis en 2006 "Energian Revolucion" kiu krom la sunenergio uzas ankaŭ ĉiujn penseblajn ekologiajn alternativojn. Castro tiam en televida parolado deklaris "Ni ne atendas ĝis la fuelo falas de la ĉielo, ĉar ni malkovris ion pli gravan - la energiŝparadon. Tio egalas al trovado de giganta trovejo de nafto." Ankaŭ en hejmoj de malrichuloj oni intershanghis energio-vorajn instalajhojn en pli efikajn (ekz-e la ardantajn lum-bulbojn, kaj fridujojn).

Audebla de Anton Oberndorfer en Esperanta Retradio: <http://peranto.posterous.com/kubo-insulo-de-energisparantoj>. Legebla sur nia retejo: http://www.verduloj.org/k_energi.htm

(dank al Leo kaj: veki@yahoo.com)

2012-07 EU-Parlamento favoras energio-efikecon

La komitato de la EP pri energio (ITRE) transdonis proponon pri nova EU-leghdono pri energio-efikeco kaj -shparado. La EU-shtatoj devos plani 80%-an reduktion je la konstruajha energio-bezono ghis 2050. Krome energio-firmaoj devos instigi reduktion de po 1,5% jare.

Claude Turmes (energi-politika parolanto de la frakcio Verduloj/Regionalistoj/Piratoj diris (lausence),

"Realigado de la redukto de energio-konsumo ene de EU havos plurajn pozitivajn efikojn:

unue ghi bremsos la klimato-shanghighon, due ghi reduktas nian ekonomian dependecon de provizado, tri ghi kreos multajn laborlokojn en la energio-efikeca esplorado kaj industrio, tion ankaŭ sur regionala nivelo."

(en) <http://www.greens-efa.eu/energy-efficiency-directive-7844.html>

2012-08-12 **Skista gaso povas esti gajnita sen damagho al la akvo.**

Prof-o Hofstaetter de la universitato Leoben (Austrio) evoluis medio-afablan metodon; en multaj landoj troveblas tia enfermita tergaso (metano); kaj ankau grandan kvanton en Austrio. Ghis nun ni uzas "koktelon" da kemiaĵoj kiuj poluas finfine la akvon kaj minacas la sanon. (pli: en la germana)
www.sonnenseite.com/Interviews,Umweltfreundliches+Frackingverfahren+fuer+Schiefergas,20,a22927.html

Atomenergio

2012-09-27 **Rusaj atomaj submarŝipoj minacas la nordan maron & la tutan mondon:**

Temas pri K-27, kiu estis submergita 1981 en la Kara-Maró (oriente de Novaja Semlija) je profundeco de 33 m pro radioaktiva akcidento (je kiu 9 maristoj mortis pro priradiado). Ghi ellasas po 851 milionoj Becquerel da radioaktivaj izotopoj jare. Tie minacas nuklea eksplozio.

Temas pri K-159, kiu pro rakeda akcidento (?) submergighis 2003 en la Barents-Maró (eble vi rememoras, ke Putin tiam ne reagis por savi la vivantajn maristojn !). Tie minacas trans-rustighado, kaj poste enakvigo de 6600 milionoj Bq da radioaktivaj substancoj ek de 2014.

La EU-Komisiono postulis levi la ŝipon, ĉar en tiu regiono oni kaptas fiŝojn.

<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Heimlich+versenktes+Atom-U-Boot+droht+Arktis+zu+verseuchen,6,a23392.html>

(lau informo de Report Mainz: <http://www.swr.de/report/>)

2012-10-14 la **Litova Popolo** diras "**Atominei - NE**" - sufiche klare: 63% diris NE !

Jen detala artikolo pri seminario en 4 litovaj urboj, organizita de la litova Anti-Atom-CSO Atgaja, kun subtenita de Greenpeace kaj la Umweltinstitut (Munkeno):

[http://umweltinstitut.org/radioaktivitat/allgemeines/atomprogramm-in-litauen-1043.html?](http://umweltinstitut.org/radioaktivitat/allgemeines/atomprogramm-in-litauen-1043.html?utm_medium=email&utm_source=Newsletter&utm_term=Atomprogramm+in+Litauen&utm_campaign=Standard+Kampagne)

[utm_medium=email&utm_source=Newsletter&utm_term=Atomprogramm+in+Litauen&utm_campaign=Standard+Kampagne](http://umweltinstitut.org/radioaktivitat/allgemeines/atomprogramm-in-litauen-1043.html?utm_medium=email&utm_source=Newsletter&utm_term=Atomprogramm+in+Litauen&utm_campaign=Standard+Kampagne)

(la sama adreso pli koncize) <http://nl.umweltinstitut.org/app/lt/?l=28no.zyhu.1sfjumvxst8k>

2012-12: **Radioaktivaj fungoj** en suda Bavario **pro Chernobilo - post 26 jaroj.**

La plej altaj mezuroj estis pli ol 2000 Bq/kg Cs-137; la limvaloro estas 600, aliaj proponas limon de 60.

Aparte en foli-arbaroj Cs estas libere movighebla, ĉar tie ghi ne alighas al la argilo-mineralo, trovebla en agroj. Tial ghi trovighas en brunaj boletoj, ĉar tiu koloro kompleksigas la elementon.

<http://umweltinstitut.org/radioaktivitat/messungen/pilze-und-lebensmittel-903.html>

2012-07-23/29 Lubiatowo (PL), **Internacia junulara tendaro kontrau atomenergio**

je la Balta Maro, organizata de Europa Junularo Por Agado.

Pollando ja intencas konstrui atomreaktorojn, sen pripensi la jarmilajn sekvojn de tia.

Por ni esperantistoj estas la aparte interesa ke ili jam pripensis la lingvajn implikojn.

"La lingvoj estos la angla kaj la pola, aliaj lau okaze".

(en) http://eyfa.org/activities/projects2/anti_nuclear_camp

La retejo de EYFA montras multajn interesajn temojn, kiuj tushas la niajn:

dauropoveco, dekreski (intense redukti la kreskadon de nia ekonomio), pensi kiel arbaro.

La aktuala kajero (#1286) de **Sennaciulo temas pri Fukushima**: <http://satesperanto.org/>

Kaj jen artikolo pri la prelego de HORI Jasuo, kiu chiutage verkis pri Fukushima, okazinta en Tarbezo, suda Francio: [http://www.esperanto-midipyrenees.org/articles/dossier.php?](http://www.esperanto-midipyrenees.org/articles/dossier.php?val=291_sukcesa+lasta+prelego+turneo+2012+horis+jasuo)

[val=291_sukcesa+lasta+prelego+turneo+2012+horis+jasuo](http://www.esperanto-midipyrenees.org/articles/dossier.php?val=291_sukcesa+lasta+prelego+turneo+2012+horis+jasuo)

Fukushima: Informa pagho de Umweltinstitut München:

(de) <http://umweltinstitut.org/radioaktivitat/allgemeines/fukushima-978.html>

2012-08-09 **Belgaj atomreaktoroj fenditaj**

Je esploro de la malŝaltitaj pro vartado atomreaktoroj Doel 3 kaj Tihange 2 en Belgio oni trovis per nova metodo de ultra-sono grandan kvanton da fendetoj en la reaktorujo.

Krome je unu el ili elfluadas radioaktiva akvo. Pro tio ili eble ne plu estos funkciigotaj.

Belgio decidis eliri el la atomenergio dum la jaroj 2016 ghis 2025.

(lau DLF, scienca elsendo, 2012-08-09)

2012-07 Atomenergio - Japanio, Bjelorusio

Homoj en Japanio protestas pro la re-aktivigo de kelkaj atomreaktoroj. Kaj samtempe oni ekscias, ke al

pluraj laboristoj-purigistoj en la eksploditaj reaktoroj estis ordonitaj kovri siajn dozimetrojn per plumbo - por ke ili povu labori pli longe en tiu viv-danghera chirkauajho. Necesas transpareco, sed tio ne estas. Rusio volas konstrui por **Bjelarusio** atomreaktoron apud Grodno, apud la rivero Nemunas/Memel, (lau tipo "bolanta akvo" - se mi ne eraras, simila teknologio al tiu de Chernobilo). Protesti (de unuopuloj) en tiu lando ne estas konsilinda.

Interese estus, kion opinias pri tio la najbaroj Pollando kaj Litovio: Ĉar ili ambau planas konstruigi atomreaktorojn en siaj landoj, iliaj registaroj ja ne povas protesti; sed certe la homoj.

2012-05-06 **Japanio: ek de (ghis) nun ĉiuj atomcentraloj haltas.** Post 43 jaroj da elektroproduktado per atomcentraloj Japanio nun estas liberigita / senigita... je tiu elektrofonto, kiu pruvis pasintjare sian dangerecon. La evento staras sur la unua paĝo de la ĵurnaloj. Ĉiu retenas sian spiradon... Ĉu la elektroproduktado sufiĉos? Ĉu paneoj ĝenos la kutiman vivon de la lando? Ĉu la registaro decidis refunkciigi kelkajn el la ekzistantaj centraloj? Manifestacioj okazas en diversaj urboj. La civitanoj sentas sin koncernataj de tiu momento. La etoso estas kaj festa kaj maltrankvila. Fakte temas pri decidita paŭzo dediĉita al kutima kontrolo de la centraloj, paŭzo kies daŭro ne estas difinita. Simbola koincido, ke ĉiuj centraloj samtempe haltas! (lau blogo de Mirjeo: <http://mirejo3.blogspot.de/>)

2012-05-06: Mirejo sendis la jenan informon per ligo - **sinteno de japanoj al iliaj atomcentraloj:** Nuntempe ĉiuj japanaj atomreaktoroj estas malhaltitaj, kelkaj por ĉiam. Japanio nun devas importi alian energion (ĉefe likvigita gaso); sed ĉiukaze devas pli efektive uzi la energion kaj investi en la alternativajn. <http://mirejo3.blogspot.jp/2012/05/energie-atomique-atomenergie.html>

2012-08-15 **Fukushima-Katastrofo kausas mis-formighon je papilioj k.a. vivajho:**

Japanaj sciencistoj de la Ryuku-Universitato* esploris je bluecaj papilioj, ke tiuj larvoj kiuj estis eksponitaj al altigita radioaktiveco montris pli altigitan kvanton da mutacioj, kies kvoto altighas de generacio al generacio.

Temis pri malpli grandaj flugiloj kaj shanghoj je la okuloj.

Ses monatoj post la katastrofo 52% de la idoj montris misformighojn. Jen kelkaj fontoj:

(en) <http://www.u-ryukyu.ac.jp/en/index.html>

(de) TAZ 2012-08-15, <http://www.taz.de/Folgen-von-Fukushima/!99663/>

(de) <http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Missbildungen+nach+Fukushima-Katastrophe,6,a23013.html>

Jen pli detale pri insektoj kaj plantoj, kun diskuto pri la t.n. **malaltaj dozoj** radioaktiveco: (Bernhard Pötter, taz, 2012-09-04, p.3)

2012-08 **Radioaktiva nutrajho** post la Fukushima-katastrofo:

Fishoj (specio Verduloj) montris 25 800 Bq / kg da Cezio; tio estas la 258-obla de la aktuala lim-valoru. Ili estis kaptitaj 20 km antaŭ la loko de la katastrofo en profundo de 15 m. Fishkaptado tie estas malpermesite, do, temis pri esplora kaptado. Fakte oni ja povis atendi tian rezulton, ĉar giganta amaso da akvo estis uzita por malvarmumi la ardantan fuelon, kaj ellasite en la maron.

Ankaŭ rizo, kolektota en la regiono, estos analizota. La limvaloru estis reduktita de 500 al 100 Bq/kg. (ARD, 2012-08-22, kaj dpa en Bad. Ztg. 2012-08-23, p.6)

2012-04-01: **Radioaktivaj nutrajhoj en Japanio kaj EU:**

Japanio reduktis nun la lim-valoroj de radioaktiva cezio en bazaj nutrajhoj.

Por lakto kaj bebonutrajhoj: 50 Bq/kg anstataŭ 200 (altigita valoru post la katastrofo de Fukushima);

por trinkakvo: 10 (200), sojoproduktoj kaj rizo: 500! (500), por aliaj nutrajhoj: 100 (500);

Sed en la Europa Unio la limvaloroj restis sur la altaj niveloj de 1986 - post la katastrofo de Chernobilo: lakto kaj bebonutrajhoj: 370, aliaj 600.

Strange, ĉar en Belarus kaj Ukrainio tiuj valoroj estas malpli altaj.

La Umweltinstitut en Munkeno postulas ke EU reduktos tiajn altajn limvalorojn, kaj krome esperas ke la nutrajhoj - ankaŭ la importataj - estas ankaŭ regule kontrolataj.

(de) <http://umweltinstitut.org/pressemitteilungen/2012/umweltinstitut-fordert-besseren-schutz-vor-verstrahlten-lebensmitteln-in-der-eu-983.html>

2012-04-22 **ITER - chu bona vojo ?**

La Europa Parlamento voĉdonis por plia sumo de 650 milionoj EUR en 2012 por daurigi la konstruadon de la nuklea fuzioreaktoro ITER, tio ne estos la fino.

Le Verduloj kontraŭ-voĉis, ĉar ĉi denove estas atoma riskoteknologio, kaj ankoraŭ tute ne certas ĉu ĝi iam funkcios la la ideo.

Ĉu denove subvencii ĝenerale la atomenergion ?

La Verduloj ankau protestas kontraŭ la planoj de la Europa Komisiono subvencii denove la atomenergion ĝenerale. Tion niaj registaroj faris dum 50 jaroj kaj tio estis jam tro.

(laŭ informo de MEP-oj Rebecca Harms kaj Helga Trüpel, 2012-04-20)

<http://www.rebecca-harms.de> ; <http://www.greens-efa.eu>

2012-02 **Pollando**, Mielno: referendumo (94,5%) kontraŭ atomreaktoroj je la bordo de la Balta Maro.

Gaski, apud Mielno - bone konata por esperantistoj - estas unu el la eblaj konstru-lokoj.

(de) <http://umweltinstitut.org/akw-polen>

2012-02-09 Sarkozy vizitis nian* malnovan atomreaktoron en Francio **Fessenheim**

Li ankoraŭ favoras la atomenergion, kaj ankau volis vendi tian teknikon ankau al Ghadafi en Libio - nun ne plu. Manifestaciis nur la laudantoj, kiuj profitas de la atomcentrala mono. La informo pri la vizit-dato estis ege mallonge antaŭ la dato; do, nur malmultaj havis la okazon manifestacii, sed tiuj estis forbaritaj !

La analizo de la atomcentralo de Fessenheim rezultis, ke necesas plifortigo de la baza betona platformo, kiu mezuras nur 1,5m, je kostoj de ĉ. 100 MEuro. (M = mega = miliono)

La regiono de suda Alsaco estas tertreme aktiva. Krom aviadila krasho kaj terorismo, la alia risko estas inundo el la Rhejno-kanalo kies akvonivelo estas 1-2 m pli alta ol tiu de la nuklea centralo. Interese ankau, ke la francaj atomcentraloj ne sufiĉe liveras kurenton, parte pro la redukto de fluanta akvo (kiun uzas la reaktoroj por malvarmigado), kaj ĉar la hejtado pere de elektra kurento estas kutima en Francio.

Pli da infana leukemio proksime de atomreaktoroj ankau en Francio kaj Britio:

Analizo de Geocop studo de Inserem en Francio montris, ke same kiel en Germanio kaj Britio statistike 44% pli da infanoj malsanighas je leukemio (sango-kancero), se ili vivs proksime de atomreaktoroj.

Do, alternativa energio-politiko helpus redukti la dependecon kaj radioaktivajn malsanojn.

*) nia: mi loĝas 30 km for de Fessenheim, en la direkto de la oftaj ventoj; kaj la sudgermana EnBW estas sesona kunposedanto de Fessenheim.

(de) <http://www.ipnw.de/startseite/artikel/395ac73006/auch-in-frankreich-erkranken-mehr-ki.html>

(laŭ informo de Axel Mayer, <http://vorort.bund.net/suedlicher-oberrhein/index.html> - ankau Esperanto)

Atombomboj: Milito ne estas la solvo:

<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Haende+weg+von+Iran+und+Syrien,6,a21272.html>

Minado, Resursoj, Nafto & Ercoj, Kemio

Videofilmo pri la minacoj de **ekspluatado de skista gaso** pere de t.n. rompado (fracking):

<http://www.youtube.com/watch?v=VHUMCGmjGsM&feature=youtu.be>

Je tiu pagho vi ankau trovas pluraj aliajn rilatajn filmetojn. Antaŭ nelonge sciencisto en Aŭstrio, universitato Leoben, esploris metodon rompigante ekspluati ter-gason uzante ne-venenajn substancojn.

2012-09-08 **Gazprom**, la giganto kiu regas 30 procenton de la eŭropa gasa provizado, estus sume kulpigata pri aliigitaj prezoj kaj pri nefidindeco en la liverado. Pli specife la rusa prigas koloso estus:

- apartiganta la prigasajn merkatojn de la EU-landoj malhelpante la liberan gasan transigon inter la EU-membroŝtatoj;

- liganta la prezon de la gaso al tiu de la petrolo.

Post la startigo de la enketo Gazprom respondis preskaŭ naive: ni sekvas la rusajn leĝojn, tamen ni pretas al dialogo.

(laŭ J-K, eu-federo@googlegroups.com)

2012-07 **Orminejo venenigas la akvon en la pluv-arbaro en Peruo:**

"Ni ricevas akvoliveradon dum nur du horoj en la tago"

Ĉi senesperiga sciigo atingis nin malmultajn tagojn antaŭe el la perua Cajamarca (Kajamarca). La homoj tie kontraŭstaras la ekspluatadon de la plej granda ora minejo de Sudameriko kiu detruas la akvofontojn de la regiono. Ankau granda rivero de la Amazonio suferos pro la minejo. La entreprenoj

Yanacocha kaj la registaro avancis laŭ besta forto kontraŭ la pacaj protestantoj.

David Vollrath laboris dum unu jaro en la media organizajxo Cajamarca kaj konas la problemon pro persona sperto. En serĉesploroj de akvo ili trovis tie tre grandan kvanton da altgradaj venenaj substancoj kiel arseniko, kadmio kaj plumbo. Tial la homoj protestas en la norda Peruo por la rajto uzi sufiĉe puran akvon, kiun ili bezonas por vivteni sin.

Chirkau fine de 2011 internaciaj protestoj sukcesis haltigi la "Conga-Projekt" – Ankaŭ vi, elmontru la emon kontraŭstari kaj favoron al la Homa Rajto je akvo. Bonvolu leteri al la Perua registaro kaj same al la Monda Banko kunproprietulo de Yamacocha. <http://www.regenwald.org/aktion/880?ref=nl&mt=1403> (dankon al Otto Vaske por la tradukado)

2012-11-14 **Finnlando: Uranio kaj nikelo en la akvaroj**

Je la nikel-minejo Talvivaara rompighis (iel) bardigo de rub-lago, kaj sekve de tio eliris granda kvanto da ege poluita akvo (ch. 600 000 kubaj metroj). La akvo en tiu basenego enhavis ch. 150 Bq da uranio.

Entute elfluis pli ol 1000 kg da nikelo, sekve de tio en proksima lago la akvo havos 450 mikrogramoj en unu litro - akceptebla estas 20; do venena koncentriteco por organismoj.

Tiu minejo ekis en 2008, kaj ghi uzas bakteriojn por eltiri la nikelon; sed evidente la procedo ankoraŭ ne estas daurigebla. La minejo poluis terenon de 100 kvadratkilometroj (ankaŭ pere de polvoj).

Medio-asocioj kaj la ministrino pri ekonomio, Heidi Hautala (Verda Partio) protestis kontraŭ la malbonkvalita laboro tie.

(laŭ R. Wolf, taz, 2012-11-10 kaj 2012-11-14)

2012-09-06 **Kemiaĵoj mortigas pli ol milionon da homoj jare**

La tutmonde rapide kreskanta uzo de kemiaĵoj estigas gravan minacon al la publika sano, diras la UN-a mediagentejo UNEP. Registaroj kaj industrio urĝe kunlaboru por malpliigi la riskojn.

La produktado de kemiaĵoj daŭre kreskas **tutmonde**. En Nord-Ameriko kaj Eŭropo la kresko estas taksata de 2012 ĝis 2020 je 25%. En Afriko kaj Mez-Oriento je 40% kaj en Azio eĉ je 50%.

"El la pli ol 140 000 kemiaĵoj, kiuj hodiaŭ estas sur la merkato, nur frakcio estas esplorita pri la sekvoj por homo kaj medio", asertas la agentejo en nova raporto. La uzado de kemiaĵoj en la industrio kaj terkultivado tial estas inter la kvin plej gravaj mortokaŭzoj, rezultigante pli ol miliono da mortoj jare kaj multoble pli da vundiĝoj kaj malsaniĝoj.

Laŭ la raporto en **Afriko sude de Saharo** la sankostoj pro malsanoj rilatantaj al la uzado de pesticidoj povas kreski ĝis 70 miliardoj da eŭroj. La taksata kosto pro veneniĝo per pesticidoj tiamaniere estas pli alta ol la entuta buĝeto por internacia helpo pri baza sanzorgo en la regiono, se oni ne enkalkulas la batalon kontraŭ HIV/Aideso, diras UNEP.

"Tutmonde, precipe en la evoluantaj landoj kaj estiĝantaj ekonomioj, la komunumoj pli kaj pli estas dependaj de kemiaĵoj, de sterkaĵoj (fekundenzoj) kaj naftoĥemiaĵoj ĝis plasto, por sia ekonomia evoluigo kaj plibonogitaj vivokondiĉoj", diras la direktoro de UNEP, Achim Steiner. "Sed la avantaĝoj de kemiaĵoj ne estu koste de la homa sano kaj de la medio. Malpurigo kaj malsaniĝo sekve de nepripensita uzado, produktado aŭ forigo de kemiaĵoj povas eĉ esti malhelpo en gravaj evoluigaj kampoj. Ili malpurigas la akvoprovizojn aŭ minacas la nutraĵan sekuron, boneston aŭ produktokapablon."

La **sekvoj ankaŭ senteblas en la ekonomio**. "La tutmonda ekonomia perdo pro malbona mastrumado de vaporigemaj organikaj komponaĵoj ekzemple taksigis je 186 miliardoj da eŭroj laŭ la raporto. "Media damaĝo en **Ĉinujo** kostis al la ĉina komerca fiŝkaptado 500 milionojn da eŭroj. En **Usono** la neregulita uzado de pesticidoj estigis koston de 1,1 miliardoj da eŭroj pro detruitaj kreskaĵoj."

Registaroj kaj industrio urĝe kunlaboru por malpliigi la riskojn, avertas UNEP. Necesas leĝaj kadroj, pli bona internacia kunlaborado, konsciigo kaj evito. (IPS/INM)

(dankon al Leo por la traduko de gazetara informo de agentejo Reuters)

Jen la originala dosiero de UNEP (2012-09-05) kiu enhavas multajn detalojn; kun ligoj al por-gazetara teksto ankaŭ en la oficialaj lingvoj de UN:

<http://unep.org/newscentre/Default.aspx?DocumentID=2694&ArticleID=9266&l=en>

Komento de AVE/mw: pro tio EU enkondukis REACH en Eŭropo; sed la verdaj MEpoj jam plendis, ke la lobio de la kemi-industrio bremsas chi-rilate. REACH = "Registrado, Evaluado kaj Akceptado de Kemiaĵoj"

Jen la dosiero en AVE-ejo (2006): http://www.westermayer.de/manfred/verduloj/m_kemio.htm
Tien mi metos ankau la informon de UNEP = UN Naturmedia Programo.

Sano kaj Agrikulturo

2012-09-18: Germanio (ktp) **Medikamentoj ktp trovighas en la trinkakvo:**

Pri tio informis Franz Untersteller, Ministro pri Naturmedio en Baden-Virtembergo.
Detala raporto havebla en la germana. (dpa/Bad. Ztg. 2012-09-18)

2012-09: **Glifosat (RoundUp de Monsanto) en nia manghajho:**

Oeko-TEST testis 20 greno-produktojn pri la totalherbicido Glyphosat (glifosat). En 14 el ili oni trovis glifosat-on, eĉ se temis pri bakitaj bulkoj (plengrenaj kun lino-semoj).

Aparte gravas, ke la agrikultuisitoj rajtas elshpruci la herbicidon mallongan tempon antaŭ la rikolto.

Supozeble pro tio la registaro akceptis relative altan limvaloron de 10 mg/kg, kompare kun 0,1 mg/kg je aliaj.

La universitato de Leipeigo trovis glifosaton en urino de homoj, kiu estas veneno.

Bonvolu subskribi la postulon al la germana ministrino pri medioprotektado, malpermesi Glyphosat:

(de) http://umweltinstitut.org/roundup_verbieten

Originala raporto pri la testoj:

(de) <http://www.oekotest.de/cgi/index.cgi?artnr=100582;bernr=04;seite=00;co=>

2012-09 **Monsanto venenigas la akvon pere de Roundup - en Sud-Ameriko !**

Por produkti ĉiam pli da sojo - plejparte por nutri viando-liverantan bestojn, finfine viando-manghantajn homojn - en suda Ameriko pli kaj pli da tropikaj arbaroj estas neniigataj. Tie vivas ankau homoj. La herbicido Roundup (glifosato) estas dis-shprucita de avadiloj al la kampoj. Ghi venenigas la akvon rekte; sed ankau pere de la grundakvo la veneno iras al la homoj.

Pro tio ni postulas al la germana registaro kaj la EU-Komisiono malpermesi la importon de sojo el sua Ameriko. Ekz-e en nia regiono kreskas biologie sojo-faboj, el kiuj oni produktas tofuon.

Bonvolu subteni la peticion - eblas shanghi al 4 lingvoj:

<http://www.regenwald.org/aktion/889?ref=nl&mt=1437>

2012-11 **Birdoj minacataj de pesticidoj:**

Pli ol 40 jaroj post la "Muta Printempo" denove estas granda minaco al birdoj. Ne nur en la "normala" agrikulturo, sed ankau en multaj hejmaj ghardenoj - ne en la vere biologiaj - oni uzas daure pesticidojn. Nova tipo, neo-nikotinoj - devenas de nikotino (kion ja shtas la fumantoj), sed ili amase mortigas la insektojn, kiuj estas nutrajho de multaj birdo-specioj: perdriko, lepro, vanelo, kukolo, k.a..

<http://www.bund.net/pestizide>

Pli pri praa agrikulturo kaj nunaj agrikulturaj bezonoj

En Américas-magazino (aŭgusto 2011) oni informas pri "camellones" en la Beni-a Valo de Bolivio:

"Camellones" [ka-me-JO-nes] estis kaj estas altegitaj terenetoj inter kanaloj. La kombinaĵo de camellones kaj kanaloj estas ege utila por dreni terenon post la alveno de pluvo kaj glaci-rivera akvo, por ke ekzistu taŭgaj terenetoj por la konstruado de domoj kaj por agrikulturo.

La indiĝenaj bienistoj kiuj partoprenas projekton por rekonstrui la kanalojn kaj la "camellones" havas pli da rikoltoj dum la jaro kaj kaptas fiŝojn kiuj eniras la kanalojn. Krom havi tiujn avantaĵojn, bienistoj nun uzas la ligitajn kanalojn dum inundoj kiel ŝoseojn por porti siajn varojn al vendolokoj.

legu pli sur: <http://www.verduloj.org/dokument.htm> > sub "Edukado, ekologio,...

(sendita de Herman

2012-11-23 : **Haltigu la perfortan setligadon en Tibeto** - Transdono de postuloj al la koncernulo pri Homaj Rajtoj kaj al la ambasadoro de PR Chinio en Berlino.

Jen informo kaj filmeto pri medio-konferenco rilate Tibeto (subtitoligita: de, en, cn)

http://www.tibet-initiative.de/de/aktionen/aktionen_kampagnen/tid_umweltkampagne_greentibetfreetibet/

AVENO jam informis pri la ekologiaj problemoj setligi nomadojn kaj shanghi herbejo-pashtadon en agrikulturon. Jam nun en Tibeto estas granda klimato-shanghigho - ankau pro la grandskala senarbarigo tie - organizite de la Pekina registaro.

Averto: Tio havos katastrofan influon al la akvo-provizo de duona Azio, inkluzive de PR Chinio. Unue venos tro multe da akvo - kaj iam poste kaj daŭre multo.

Tibeto bezonas nomadan kulturon kaj indigenan budhismon - la Han-kulturo ne taugas tie.

(2012 - eo) : http://www.westermayer.de/manfred/verduloj/38/a38_eko.pdf

Christian Lavarenne kaj Manfred Westermayer (mi) verkis detalan artikolon pri tio, kiu estis publikigita en TSKT 1996, kaj dank al la chinaj esperantistoj ankaŭ tradukita en la chinan.

(dulingva teksto: eo & cn) Tutmonda Scienco kaj Tekniko (1996) http://www.verduloj.org/tib_senarba.htm

2012-10-14 **La kvanto de varoj ĵetitaj** povus nutri sepfoje ĉiujn loĝantojn malsategaj en la mondo.

La legomoj ne estis sufiĉe belaj por esti aĉeteblaj, ili do devis esti detruitaj. Asocio rekolektis ilin kaj kuiris gigantan kareaĵon senpagan por 6.000 personoj por denunci la malŝparadon. Malgraŭ la pluvo, la operacio allogis la homamasojn sur la placo de Pariza urbodomo, sabaton je tagmezo. La gapvaguoj vicumis por plado da legom-kareaĵo aŭ glaso de pomsmuzio, servata senpage.

Prefere ol fini en pistomaŝinon, 400 kilogramoj de tiuj fuktoj kaj legomoj estis disdonitaj senpage en korbetoj, kaj kun la restaĵoj la organizantoj povis servi ties kareaĵon al ĉirkaŭ 6.000 kunmanĝantoj.

En Francio, la nutraĵa malŝparado altiĝas po 2,3 milionoj de tunoj jare en la superbazaroj, kaj 1,5 miliono da tunoj en restoracioj. La manĝaĵoj juĝitaj maltaŭgaj por vendo finas en pistomaŝinon aŭ sub litroj da klorakvo por ke ili ne estu rekolektitaj en la superbazarajn kompoŝtilojn. Francaj familioj forĵetas po 20 kilogramojn da nutraĵoj jare kiuj plu povus esti konsumitaj.

Entute la kvanto de varoj ĵetitaj (tutmonde ?) povus nutri sepfoje ĉiun malsategulon de la mondo.

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Smuzio> (simile: /Rungis kaj /Val-de-Marne)

<http://www.franceinfo.fr/societe/un-curry-geant-prepare-avec-des-legumes-destines-a-la-poubelle-768003-2012-10-13> , (danke sendita de Isabelle NICOLAS)

2012-09-19 **Good Food March / Marshado por Bona Nutraĵo:**

Okazis migrado, kiu atingis Bruselon je la 19a septembro por peti ekologian kaj homrespektan reformon de la komuna agrikultura politiko (KAP). En 2012 okazos reformo de KAP de EU.

Se vi, kiel esperantisto, pretas partopreni jen kelkaj postuloj (vi povas meti ilin ankaŭ sur vian retejon):

Por justaj prezoj por kampuloj kaj konsumantoj, Por vera respekto de la naturmedio, Por nutra suvereneco

Por pli bona nutrado kaj bona agrikulturo, ĉie: <http://www.goodfoodmarch.eu>

(dankon al Fabien, E-D-E)

Chu senlakta dieto evitas mamkanceron ?

Chu la **veganoj** havas sperton chi-rilate ? Lau rakonto de usona virino, kiu eksciis tion en Chinio, eĉ jam kreskinta mam-kancero reduktighis.

2012-08 **Afriko, Reala Nutraĵo Revolucio:**

Mi partoprenis prezenton de la Civil Sociala Organizajho OTEPIC, Kitale, Kenio.

Philip Odhiambo Munyasia, kiu organizas OTEPIC, montris en Freiburg kiel li komencis la projekton.

Li sekvas racian vojon de evoluigo, cele al "Real Food Revolution", kies 9 maksimumoj estas:

Agadu kune en komunumoj

Kreskigu legomojn en miksitaj kulturoj - sen kemiaĵoj. Reciklu la organikan defalajhon por produkti komposton. Lernu, ke akvo estas vivantaĵo. Estu afable kontraŭ bestoj. Kreu enspezon de la plusaĵo.

Savu kaj retenu la semojn. Uzu sunenergion au biogason por kuiri. Intershanghu kun viaj najbaroj.

Jen ilia retejo (angle): http://otepic.org/index.php/About_us

2012-12-07 Rotenon au Derrin, **biologia insekticido kaj akaricido** (kontraŭ iksodoj)

el radikoj de fabaceoj, ekz-e Derris eliptica ("Tuba-radiko").

Ghi estas venena ankaŭ kontraŭ fiŝoj; krome ghi **kauzas Parkinson-malsanon**, ĉar ghi mortigas nervoĉelojn. Tiu estis jam delonge suspektita, sed nun pruvita. (lau taz 2012-12-07, p.18; de Nature Scientific Reports)

2012-12 **Besto-tenado & -protektado:** ekz-e Kokinoj. Intervjuo kun s-ro Hoehne, de kooperativo de

mezgrandaj kokino-bredantoj diris, ke kvanto da 3000 kokinoj en unu stablo kaj kuna herbejo estas limo.

Interese ankaŭ, ke la kokinoj ja konas la homojn kiuj zorgas por ili; kaj same devus esti respekto de la homo rilate la bestojn. En pli grandaj tenejoj pliighas malsanoj, kaj ligita por preventi la malsanojn oni uzas antibiotikojn. (lau taz. 2012-12-06, p.9 kaj taz 2012-12-04, p.3)

2012-05 **Trinkakvo enhavas medikamentojn** ktp

EU planas aldoni 15 plurajn al la 33 kemiaĵoj en la Kadrodirektivon pri akvo.

Klaus Kiemmerer de la Instituto pri daŭropova kemio kaj mediokemio en la universitato Leuphana (Lueneburg, DE) klarigis:

kelkaj medikamentoj trairas la korpon senshanghite, ekz-e diclophenac kaj ethinylestradiolo, kiuj minacas la renojn kaj la reproduktivecon de fiŝoj. Aliaj venenoj ekz-e estas kemiaĵoj el teksaĵoj (polifluorizitaj) kiuj trairas la klarig-instalajhojn por mastrumaj elfluajhoj senshanghite.

La celo estas redukti la eligon da kemiaĵoj, necesas plani tion jam je la produktado. Necesas elekti medikamentojn ankaŭ pro ilia metabolismo; tiuj kiuj trairas la korpon senshanghite, supozeble poste troviĝas en la riveroj, kaj estas malfacile - kaj multekoste - elimini ilin el la akvo.

2012-01 **Monsanto mortigas (ne nur plantojn) pere de Roundup:**

Glyphosat (glifosato) La Verduloj en Germanio postulis esplori la cheeston de **glifosato en grundakvo**. La ministerio diris ke ne eblas, lau informo de la produktantoj. Pro tio oni ne kontrolas la grundakvon lau glifosato. Sed en Hispanio oni trovis koncentritecon kiu superas la germanan limvaloron je la 25-oble. Ankaŭ en Usono oni ofte trovas glifosaton en lagoj kaj riveroj.

Umweltinstitut postulas malpermeson en Germanio: (de) <http://www.umweltinstitut.org>

Glifosato estas veneno por la cheloj.

Roundup, Glyphosat (N-(Phosphonomethyl)glycin), evoluita de Monsanto, estas ampleks-mortiga herbicido. Monsanto evoluis GMO-kolzon (k.a.) kiu estas rezista kontraŭ Glyphosat, kaj vendas ambaŭ kune. Sed ĝi ankaŭ povas mortigi grundajn insektojn kaj reduktas la fekundecon de la grundo (laŭ Univ-o Buenos Aires) .

Surface sur la hauto ghi ne estas venena, sed en kombino kun Tallowamin, kion oni kunmetas por pli facile enirigi la molekulon en la plantajn ĉelojn; sed tio ankaŭ funkcias je animalaj ĉeloj. Tion oni esploris en franca universitato de Caen, kaj trovis altan toksecon kontraŭ homaj ĉeloj el la umbiliko-ŝnuro. ("taz", 2009-07-07, p.8)

Ghardenisto kiu somere aplikis Roundup sur gazonoj en Brunsvigo (DE), mortis dum la aplikado. Li estis tute sana, nur tiam plendis pri kapdoloroj kaj larmantaj okuloj. Bedaurinde oni ne vere esploris la kazon de lia morto. (lau Christian Gehre, taz, 2012-01-13, p.9)

Pluraj artikoloj pri la temaro "GMO" aperis en Sennaciulo 2010-Majo.

Informoj pri Glyphosat troviĝas ankaŭ en Vikipedio, sed en Esperanto nur komenca teksto.

Pesticid-Agada Retaro (PAN): <http://www.panna.org/>

Marihuana bonas por la pulmoj, subtenas la liberigan tusadon.

Ghies THC (tetrahidro-kanabinolo) ankaŭ helpas kontraŭ spasmoj kaj tiuj nekuraĉeblaj malsanoj kiel multipla sklerozo, fortaj doloroj (je kancero), kaj povas subteni la eliron el pli fortaj drogoj. Tamen ghi povas kromefiki malbone je psihhe malstabilaj homoj.

Tio estas la rezulto de longtempa studo en Usono.

(lau Matthias Broeckers, taz, 2012-01-02)

2012 **Sardinio detruas kemiajn armilojn, kaj tiel mortigas homojn.**

Unu el la kazonoj estas Uranio el DU-municio kaj Thorio el Milan-rakedoj, kiuj estis testitaj tie; la polvo sternighis kaj tiel einiris en la homojn - pri bestoj mi ne legis - eble ilia vivo estas tro mallonga?.

Uranio estas venena (por la renoj), kaj Thorio disfalas malrapide 14 mrd jaroj, sed post 25 jaroj unu el la fenditaj produktoj amasighas, kiu efikas pli danghere. Multj soldatoj kaj pashtistoj malsanighis je leukemio kaj limfomoj. Finfine oni esploris la ostojn de ekshumitaj korpoj de 20 pashtistoj kiuj mortis tro june- kaj trovis Thorion.

<http://www.zdf.de/ZDF/zdfportal/web/ZDF.de/planet-e/2942534/23959666/f62cfb/Sardiniens-t%C3%B6dliches-Geheimnis.html?mediaType=Artikel>

2012-07 **Biofuolo povus esti pli ekologie:** Nuntempe kreskas la areoj da majzo-monokulturoj - ĉefe por nutri biogas-generatorojn. Plej ofte sen shangho de la planto-tipo - kio ebligas la trud-insekton plenan ludejon por gajni rezistenco, ech kontraŭ tiu BT-majzo (kion oni ĵhus spertas en Usono). Nova evoluo montras, ke miksajho de "sovaghaj" plantoj sur tiaj kampoj povus anstataŭigi la majzon. Tio havus la avantaĝon ke oni praktike ne bezonus kemiaĵojn (fekundenzo kaj insekticidoj) kaj povus rikolti dum pluraj jaroj - ech la kvanto da rikoltajho estas ne tro malalta. Intertempe papilioj, abeloj k.a. bestoj povus vivi tie. (de) <http://www.badische-zeitung.de/wildpflanzen-koennten-den-mais-beim-biogas-ersetzen>

2012-08 **Rojoj estas poluitaj de agroj**

Sciencistoj de la germana universitato Koblenz-Landau esploris riveretojn, rojojn kaj lagojn proksime de agroj. Tie ili trovis surprize altan kvanton da insekticidoj.

(2012-08-10, <http://www.umweltinstitut.org>)

2012-08-12 **Hindio venenigas homojn per insekticidoj** - je produktado de Cashew-nuksoj

Dum almenau 20 jaroj en Hindio okazis shprucigo de kampoj por Cashew-nuksoj el helikopteroj pere de Endosulfan, sen protekti la homojn.

Pli ol 6000 homoj en 22 vilaghoj estas malsanaj, multaj mortis pro tio, kaj naskighis kripligitaj.

Dum monatoj manifestacias patrinoj antaŭ la registara sidejo.

(de) <http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Indien+Giftiger+Regen,6,a22924.html>

2012-08 **Ni ne manghu ksenohormonojn:**

Pesticid-Agada-Reto en kunlaboro kun aliaj CSO-oj verkis broshuron kiu montras la minacon rilate hormonaj shanghoj pro pesticidoj au aliaj kemiajhoj en la manghajho: aparte en legomoj kaj fruktoj, sed ankaŭ en la pakajho-materialo.

<http://www.disruptingfood.info/>

Pri la plastajhoj vi jam trovas mian prelegon (pdf-forme) en Esperanto sur nia retejo:

<http://www.verduloj.org/dokument.htm> , serchu "Plastajhoj".

2012-08 **Danmarko malpermesas la plej dangherajn moligenzojn kaj BPA**

Temas pri: DEHP, DBP, DIBP kaj BBP - vi trovos la detalajn informojn pri tiaj substancoj en mia (mw)

prelego: "Plastajhoj kaj akvaroj" en la AVE-retejo: <http://www.verduloj.org/dokument.htm> (serchu "Plast")

Lau tiu artikolo Bisfenol A (BPA) estis jam malpermesita. Bedaurinde la EU-Komisiono ne tiom rapide reagis, char tie regas tre forta lobio de la kemia industrio.

(lau Reinhard Wolf, taz, 2012-08-27, p.8)

La Gaviotas - de pluarbaro al dezerto - **de dezerto al pluarbaro kiu ebligas arbaroghardenado:**

vidu pli en http://www.verduloj.org/k_rearbarigo.rtf

Pli da informoj pri daŭropova agrikulturo & Terra Preta:

(de, en, fr) <http://www.delinat-institut.org/>

(de) <http://www.sonnenseite.com/Eine+Welt,Baeume+als+Regenmacher+in+der+Steppe,18,a22255.html>

2012-08-12 **Tanzanio: bonvolu subskribi favore al la Masaj**, kontraŭ richuloj-chasistoj

La Masaj-etno estas duon-nomadaj pashtistoj en Tanzanio kaj Kenio. la reghaj familioj el Arabio shatas teni grandan areon por chasi, kaj sekve de tio oni forpelus la homojn. Bonvolu peti la prezidenton Kikwete, ke li ne subskribu tian dekreton. La peticio estas (almenau) en la angla, germana kaj itala:

(en) https://secure.avaaz.org/en/save_the_maasai/?aGgALab&s=1

2012-08 **Nomadoj bezonas siajn tradiciajn rajtojn uzi la landon.*1**

Oni certe supozas, ke nomadoj uzas la landon de aliaj homoj; sed tiel ne estas.

Nomadoj apartenas al tiuj regionoj kie ne daŭre eblas vivi kun gregoj da bovoj, shafoj, kameloj, jakooj ktp..

Ili devas migri kun siaj gregoj de unu loko al alia - simile kiel la migro-birdoj.

Dum pluraj miljaroj ili vivas tiel, kaj kutime ne trouzas la naturajn resursojn.

Jam en la biblio estas priskribita la konflikto inter Kain (la agrokulturisto) kaj Abel (la nomado); chiukaze Kain mortigis Abel-on char tiu volis pashti sian gregon sur la kampo de Kain. Oni diras, ke ankaŭ la konflikto en Darfur (Sudano) okazis pro tio (eble ghi estis pli komplike).

Aktualaj konfliktoj estas en Jordanio, Tibeto, Etiopio:

Beduenaj kamel- au nun shaf-bredistoj en Badia (sud-orienta Jordanio) migris kun siaj shafoj al la nordo kiam tie pluvis - nun per kamiono - char limoj kaj aliaj baroj malebligas la migradon. Antaŭ la fondo de la shtatoj ekzistis interkonsentitaj rajtoj, kiuj ebligis la migradon en regiono de 1000 km. Nun oni plantas legomojn por la chefurbo Amman, sed tiel senrajtigas la beduenojn. Chiukaze la pashtado estis daŭropova, char oni ne uzis kemiajhojn kiuj povas venenigi la akvon kaj malfekundigi la grundon.

Simile en Maroko au Sudano, kie mil-jara pashtado akompanita de produktado de mielo, kurac- kaj spico-herboj kaj Araba Gumo zorgis por konstanta ekonomio.

Ekzistis kodekso de la pashtistoj, kiuj limigis la uzon.

En Etiopio nuntempe pashtistoj estas marghenigataj. La registaro lu-donas gigantajn areojn de la plej bona

grundo al eksterlandaj kompanioj el Arabio, Europo, Chinio, kiuj kreskigas tie grenojn por siaj landoj. Tio gvidas al konfliktoj inter la diversaj etnoj, ĉar kie homoj vivis en balanco kun la regiona natura produktiveco, nun alvenas pliaj homoj.

Kaj P.R.Chinio favoris grenproduktadon en la Interna Mongolio kaj eĉ en Tibeto, regionoj kie agrokulturo gvidas al rapida erozio, plifortigita per grandskala malarbarigo*2 . Krome temas pri kultur-politika problemo, ĉar la registaro malfacile povas kontroli migrantajn homojn.

*1 aktualaj informoj lau Fred Pearce, Le Monde Diplomatique (de), 2012-Augusto, p.7

*2 Esperanto en Scienco kaj Tekniko (1996) http://www.verduloj.org/tib_senarba.htm

Komentoj al la artikolo pri Nomadoj:

Komento de Roy: La registaroj lu-donas la areojn:

1. sen demandi la koncernatajn homojn

2. je ridinde malalta lu-prezo - kaj tio eble pro korupta intertraktado.

Komento de Mirejo: La shtatoj ĉiam klopodas malnomadigi la etnoj, por povi postuli pagon de impostoj. Postkuri nomadojn tiucelen estas malfacila tasko (nekonfirmita, sed ankaŭ ebla argumento).

Respondo de AVE/mw: nomadismo estas natur-devigata fenomeno - la registaroj devus trovi taŭgan manieron ekspluati la impostojn de la nomadoj.

2012-05 FAO helpas al kamparanoj teni sian grundon - kontraŭas "land-rabadojn":

Ghis nun en multaj landoj, aparte en Afriko, ne ekzistas propra posedo de la grundo. Kelkaj koruptaj registaroj (en Ugando, Etiopio, k.a.) malrespektis la vivbezonojn de la kamparanoj, kaj ili simple vendas au lu-donas gigantajn fekundajn areojn al eksterlandaj agro- kaj nutrajho konzernoj. La kamparanoj poste au "rajtas" labori kiel malmultekostaj laboristoj au estas movigataj al regionoj, kie kutime troviĝas malpli bonaj grundoj.

FAO (nutrajho kaj agrikultura organizajho, kiu kunlaboras kun UN) nun decidis dekreton, kiu devigas la registarojn zorgi por sekura posedo- au uzo-rajto. Kaj se necesas malpropriigo, tio devas okazi lauleghe kaj kun valida samvalora rekompenco. (lau D. Johnson, taz, 2012-05-12)

2012-05-03 GMO - kashigita morto de bovinoj

La svisa Syngenta produktis BT-majzon 176 (BT signifas ke tiu per genteknika shangho produktas la toksinon (venenon) de la Bacillus thuringiensis. Bovino-bredisto kiu nutris siajn bovinojn per tia majzo; sekve de tio mortis pli ol 10 (el 75) en la jaroj 2000 & 2002.

Aparte gravas la fakto ke Syngenta jam sciis, ke bovinoj mortas post manghado de BT-majzo 176 (testo estis haltigita 1996 post kiam mortis la unua bovino). Tiam la bredisto ricevis kompensacian monon de Syngenta, kun la devo ne paroli pri la afero.

Sed intertempe li kun advokato elkovris, ke tiu minaco jam estis konata ek de 1996.

ne nur mortis la bovinoj sed ankaŭ la fido en tian firmaon, kiu sciis la minacon sed kashis ghin, anstataŭ raportoj al la respondeculoj de la shtato.

Trafiko

Bicikli kun kasko havas du flankojn - lau esploro en Austrio:

Unuflanke ghi zorgas por malpli gravaj sekvoj en kazo de akcidento - kie la kapo estas trafita.

Aliflank la nombro da biciklantoj reduktighis je triono pro la devo porti biciklan kaskon, kaj la risko de la biciklistoj altighis. Por altigi la sekurecon, Bettina Urbanek de VCOe proponas plibonigi la strukturon: pli da biciklovojoj, kaj redukto de la rapideco sur normalaj eksterurbaj stratoj.

<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Radhelmpflicht+fuehrt+zu+weniger+Radfahren,6,a22462.html>

Aldone de AVE: Krome necesas **instrui pri la aparta risko je kamionoj pretervidi bicikliston**, kaj enkonduki pli bonan spehgulo-sistemon.

Ekonomio

Anne informis: Paralela mono/devizo montras eliron el la Euro-krizo:

(en diversaj lingvoj) <http://www.eurorettung.org/66.0.html>

2012-09 Dum ankoraŭ kelkaj tagoj spektiblos rete la dokumentfilmo

"Goldman Sachs, la banko kiu regas la mondon".

Meze de la filmo, oni komprenas kiel Goldman Sachs ne estis kondamnita en Usono post ilia fifaro, kiu

provokis la subprime-krizon (ili mem spekulaciis je kolapso por gajni monon). Ili havas eks-salajrulojn kiuj laboras ĉe trafikaj regpostenoj kaj kiu plu servas la bankon. La fino de la dokumento estas aflikta, ĉar oni konstatas ke ankaŭ EU estas enfiltrita de eks-Goldmananoj, unuakape estas la direktoro de la centra banko mem. La influa sfero de Goldman Sachs estas giganta. Fine de la dokumentfilmo, estas dirite: "europeanoj asistas je povokonfisko far la bankistoj. Per influo au per komplikaj fikonsentoj, politikistoj elektas nun fajrobrigadistojn, tiujn samajn fajrobrigadistoj, kiuj kelkajn jarojn antaŭe rolis kiel incendifajrigistoj inundante la merkaton per toksaj produktaĵoj."

(fr): <http://videos.arte.tv/fr/videos/goldman-sachs-la-banque-qui-dirige-le-monde--6894428.html>

(dankon al Fabien)

2012-09: Jhurnalo de la Europaj Verduloj pri **alia maniero de kreskado:**

<http://www.greeneuropeanjournal.eu/towards-ecological-modernity-with-nature-as-our-example/>

2012-10-29 Verduloj kontraŭas la instigon flanke de la Europa Komisiono

al **privatigo de akvo-provizaj** firmaoj en financaj malfortaj landoj de EU (ĉefe Portugalio kaj Grekio):

Heide Ruehle, MEP, Verduloj/EFA diras, ke oni ja vidis (ekz-e en Berlino) ke privataj konzernoj tre altigis la prezojn por havi profiton. Pro tio la civitanoj havus damagħon.

(pli en la germana): <http://www.heide-ruehle.de/heide/fe/pub/de/dct/917>

UN Department of Economic and Social Affairs.

Statistikaj datenoj pri la **redukto de malricheco** (en la oficialaj lingvoj de la UNo):

<http://www.un.org/en/development/desa/newsletter/desanews/2012/02/index.html>

2012-09-08 **EU direktighas al federismo:**

La nova plano de la Eŭropa Centra Banko pri la aĉeto de ŝtataj biloj kolektis multajn konsentojn kaj ankaŭ tiun de la franca Financministro, kiu citis je "persona nivelo", inter la venontaj alprenendaj rimedoj, pli da fiskan union direkte al "federismo" en la eŭroareo, kun la samtempa kreo de komuna financministro.

Ja la vorto "federismo" restas granda tabuo - ne oficiale eldirebla, malgraŭ nepra - fronte al mito de la naciaj suverenecoj.

(lau J-K, eu-federo@googlegroups.com)

2012-12: **Svislando - fermighadas sian fiskan paradizon por nigraj monoj**

per malgrandaj paŝoj adekvatiĝas al internacia kaj eŭropunia normaroj por forskui de si la etiketon je fiska paradizo. Hieraŭ registara proparolanto oficiale anoncis ke ekde la 1a de januaro Svislando

- akceptos nur monajn deponojn fiske korektajn, t.e regule deklaritajn en la originaj landoj;

- ne plu estos distingo inter monreciklado kaj impostevito.

Nu, ekde la venonta jaro, nur "pura mono" en Svislandon... kaj ankaŭ en Singapuron (?)

(dankon al GK Rinaldo, de EEU).

2012-10-22 **Cohn-Bendit postulas fini la imposto-fraudon** kaj intershtatajn interkonsentojn kun Svisio:

Ankoraŭ daŭras la senlira situacio en la traktado inter la Eŭropunio kaj Svislando pri la fiska interkonsento, atigenda antaŭ la jarfino. La Unio postulas fakte la rezignon de la fiska sekreto kaj Svislando klopodas tion eskapi per apartaj interkonsentoj kun la membroŝtatoj.

Inter alie dum ĉi semajno la germana Parlamento sin prononcos pri la duflanka interkonsento kun Germanio. kio tamen ne senvalidigos la evoluon de la komuna interkonsento kun EU.

Rilate al tio Cohn Bendit, la ege konata verda deputito en la Eŭropa Parlamento, en intervjo al dimanĉa revuo SonntagsZeitung sin deklaris malfavora al la duflankaj interkonsentoj kun Germanio kaj Britio, kiuj ne devigas komuniki la nomojn de la impostevitantojn. Kaj li denoncis:

- ke "Svislando devas pripensi ĉu ankoraŭ gastigi la fiskan deprenon";

- ke estas absudaĵo ke Svislando celu protekti la privatecon de la klientojn per la banka sekreto, kiam la homaj rajtoj estas asociitaj al krimoj.

Rilate al la banka sekreto li proponis enigi jenan regulon: "Kiam civitano deponas pli ol iun difinitan sumon - ekzemple 20.000 € - tio devas esti tuj komunikata al la fiska administracio de lia lando".

Li konkludis dirante ke EU devus uzi la saman strategion de Usono, kie la "Foreign Account Tax Compliance Act" devigas la bankojn komuniki al la usona fisko ĉiujn kontojn tenatajn de usonaj civitanoj.

(J-K Rinaldo el Padova.IT.EU - en blogo de Europaj Federistoj)

2012-08 **Filmo pri Lobiado en EU**

Dokumenta filmo de Fritz Moser montras la laboron kaj retaron de la lobiismo "The Brussels Business".
Kaj la organizajho Lobbycontrol.de agadas por ke tiu kunlaboro estu pli travidebla.
(de) <http://lobbypedia.de/index.php/Hauptseite>
(en) <http://blog.brusselssunshine.eu/>

2012-08 **Civitanoj en Rusio por haltigi la lavangon da plasta rubajho**

Evidente en Rusio ankoraŭ ne ekzistas ordigita reciklado de plastajhoj kaj de aliaj resursoj. Kio bone funkciis en la Sovetunio, estis forgesita en la periodo de merkata kapitalismo. La administracio nur zorgas, ke la rubajho estu shutita al granda monto au en valon (kie ghi endangherigas la vivejon kaj la akvon). Jen du retejoj de CSO kiuj agadas mem:
<http://www.musora.bolshe.net>
<http://letsdoitworld.org>
(lau P. Tillmann, gazeto Russland Heute 2012-07-04, vidu ankaŭ: www.Russland-heute.de)
Kommento de AVE/mw: En Germanio oni uzas tiajn postlasajhojn kiel fonto de tergaso.

Planita obsoleto (maltaugeco):

Firmaoj ofte produktas varojn kies vivdaŭro estas intence malpli longa ol ebla.

Ekzemploj:

nilonaj shtumpoj, ardantaj lumo-ampoloj, printiloj, mikro-komputiloj de Apple.

(de) <http://tv.orf.at/groups/magazin/pool/newtonablaufdatum280112txt>

tute koncize en (eo) <http://eo.wikipedia.org/wiki/Obsoleto>

Jen artikolo el 2007 pri la sama temo:

(en) <http://www.theinquirer.net/inquirer/news/1001739/open-source-weapon-planned-obsolescence>

Chu iu havas inform-fontojn en aliaj lingvoj ?

IT-Reciklado: <http://www.germanwatch.org/corp/it-recycling.htm>

PV-reciklado (de fotovoltaikaj platoj): <http://www.pvcycle.org/>

2012-05-09 **superi la EUropan Krizon**

30 europuniaj politikistoj (EMI) verkis apelacion publikigita hodiaŭ en "Le Monde", "corriere de la Sera" kaj "taz". El la Verduloj partoprenis Daniel Cohn-Bendit kaj Monica Frassoni.

Koncize: evolui la Traktaton de Lisabono cele al Federismo kaj komuna ekonomia kaj financa politiko.

Grekio elspezas ankoraŭ tro multe por la militara ekipajho.

Chu donacitaj tankoj el Usono estas senkostaj ? Usono ne plu bezonas 1000 tankojn, kaj Grekio ricevis la oferton elekti 400 el tiuj, senkoste. Sed la transporto kostus plurajn milionojn (gajno por la grekaj ship-kompanioj), kaj poste necesas rekontrolo, amaso da fuelo, kaj finfine obusoj - chio kostus milionojn.

Malgrau tio, ke Turkio certe ne okupos Grekion, la registaro investis en la pasinta jardeko plurajn miljardejn por aĉeti tankojn el Germanio, kaj interesighas pri novaj militshipoj (fregatoj) el Francio.

Fakte tiuj registaroj forte subtenadas tiajn vendojn de siaj industrioj.

Almenaŭ la planita aĉeto de milit-aviadiloj Eurofighter (je ch. 5 miljardejn) estis haltigita nun.

(lau Gerd Hoehler, taz, 2012-01-18)

Komento AVE/mw: pli taugus investi milionojn en propra industrio por munti, funkciigi kaj eble ankaŭ produkti ekipajhojn por ĉerpi la regajneblajn energiojn.

UBUNTU - Universala Deklaracio pri Demokratio

Ni ja spertis, ke la demokratia principo helpas por krei partoprenan socion; tamen ni vidis ke lobiado kaj retajhoj de influhavaj grupoj malegaligas la shancojn.

Se jam ekzistas demokratio 51% sufichas por decido; kaj tro ofte la atingo de tiuj voĉoj estis kreita dank al influo, kiun donas ekonomia graveco kaj mon-bazita lobiado.

<http://www.ubuntu.upc.edu>

(ne temas pri la versio de Linukso)